



SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto - Federacio « Languedoc - Roussillon »

5, Quai Vauban - **PERPIGNAN** (P.O.) - Téléphone 34-38-84

N° 31 -----Jara Abono : 2 F. -----1a Trimonato 1969 -----

C.C.P. 956 28 MONTPELLIER.

ooo

SUDFRANCA STELO deziras al vi Feliĉan Jaron kaj fruktedonan laboron por Esperanto en 1969.

--:--:--

KION FARI POR ESPERANTO ?

Oni devas kiel eble plej konigi la ekziston de Esperanto. Tio estas necesa. Ĉiuj seriozaj esperantistoj sentas tion. Estante relative malmultaj, la esperantistoj devas aviti ke ilia nombro aspektu ankoraŭ pli malgranda ol ĝi estas. Facile, simple sen-pene ni povas surporti la verdan stelon. Pri alia rimodo mi volas atentigi nun la samideanojn. La personoj kiuj ŝatas aŭ devas pli malpli multe korespondi kutimas stampi sian adreson sur folioj kaj kovertoj de la leteroj. Tiu simpla gesto oni povas ankoraŭ fari por diskonigi Esperanton. Kelkaj samideanoj uzas stampilon kun la teksto :

APPRENEZ L'ESPERANTO aŭ ESPERANTO

LINGVO INTERNACIA

Persono ni preferas la duan ĉar ĝi metas antaŭ la okuloj de la vidantoj tekston en Esperanto facile kompreneblan; ĝi taŭgas por Francio kaj eksterlando.

Kelkaj personoj mokas pri la propagando sur leter-kovertoj. Ili iom pravas ; oni ne devas troigi. Koverto ŝarĝita per tro multaj stampaĵoj povas aspekti ridinda. Diskroteco estas ĉiam ŝatinda kvalito. Ni nepre evitu miksi Esperanton en io ridinda . Sed la sobraj tekstoj kiuj mi menciis ĉi supre ne aspektas ridindaj.

Tiu stampilon ni devas uzi ne nur kiam ni skribas al esperantisto sed ankoraŭ pli kiam ni skribas al ne-esperantistoj, eĉ al administracioj, laleterportistoj kaj la ricevantoj povas vidi la stampaĵon. Tiuj personoj povas pensi kaj diri : " Esperanto ekzistas Esperanto estas internacia lingvo " ĉar de tempo al tempo ili havas la okazon legi tion.

Do karaj samideanoj, vi ne estu sekretaj esperantistoj, senprokraste motu verdan stelon ĉe la buton-truo de via jako kaj stampu ion pri Esperanto sur viaj leteroj. Tiel, se iam iu diras: "Mi ŝatus havi informojn pri Esperanto", tuj iu povos respondi: "Vi demandu al S-ro X., li estas konata kiel esperantisto."

P. LUBIK.

=====

ALES

Kiel dum la antaŭaj jaroj du kursoj funkcias ĉe la kulturdomo. Dek personoj partoprenas la unuan gradan, inter kiuj unu juna anglinino instruistino pri angla lingvo en bublernejo.

Sannombraj estas la ĉeestantoj en la perfektiga kaj konversacia kurso.

La monata kunveno de la grupo okazas la unuan lundon de la monato.

Pro tro longa distanco ni bedaŭrinde ne povis partopreni la interfederacian renkontiĝon en Lezignan-Corbières. La organizintoj bonvolu senkulpigi nin.

Niaj afablaj kaj sindonemaj gesamideanoj SANTAMARIA, ĵus forlasos nin por Gardano kie nia amiko, inĝeniero, okupos novan postenon. Ni multe bedaŭras ilian foriron kaj deziras al ili bonŝancon en iliu nova restadojo.

ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN AVIGNON.

Niaj Avignonaj samideanoj invitis la Gard-Federacianojn al renkontiĝo en la Vaŭkluzo ĉefurbo, la 16an de februaro. Sed kompreneble ĉiuj esperantistoj el kiu ajn departemento estos bonvenaj.

La tagmanĝo okazos en restoracio (ne multekosta.)

De nun bonvolu rezervi tiun dimanĉon kaj anonci vin al Raynaud 4 Rue Chotard 30 ALES. kiu sendos siatempe, ĉiujn pliajn informojn.

=====

Lau la gazet-eltrancaĵoj senditaj de S-ro SAYAG, la gazetaro en Narbonne, kaj ĉefe "L'Independant" multe raportas pri la esperantista agado en Narbonne. Anonco de kunveno de la grupo kun "ordre du jour", anonco de la ekspozicio "Le livre esperanto", bonega artikolo pri esperanto, tradukoj, literaturo, k.t.p. okazo de tiu ekspozicio

Aperis ankaŭ foto de la ekspozicio en Lezignan kun subraporteto pri la interregiona renkontiĝo de la 10 a novembro.

GARD ESPERANTA FEDERACIO

La Gard-aj esperantistoj kunvenis en Nimes la 15an de decembro por krei departementan federacion.

Ceestis ĉirkaŭ 25 gesamidoanoj el Nimes, Alès, Aiguos-Mortes, Le Cailar, Cendras, La Grand-Combe.

La federacio celas :

- a) unuigi ĉiujn Esp-grupojn de la departamento kaj krei ligilon inter la izolitaj esperantistoj kaj la grupoj.
- b) intensigi la kulturan kaj edukatan agadon de Esperanto kaj certigi ties pli vastan disvastiĝon.

La administrantaro konsistas el tri anoj el la Nimes-grupo, tri el la Ales-a kaj tri el la izolitaj esperantistoj. :

Prezidanto :	RAYNAUD René	ALES
Vic Prezidanto :	Volpeliere Roger	NIMES
Sekretario :	VIGNE Henri	ALES
Vic Sekretario :	PELLETIER Rolph	ALES
Kasistino :	S-ino FRUS	NIMES
Membroj :	ANGEVIN Lucien	LE CAILAR
	ALONZO Ricardo	AIGUES-MORTES
	JANNEZ Hubert	NIMES
	DALGON H.	St LAURENT-La-VERNEDE

Jarkotizo : 2 F al kiuj estus profite aldoni 2F. por abono al Sud-Franca Stelo, trimonata bulteno, rolanta kiel ligilo inter la esperantistoj de la Sud-Franca-Rusiljono.

Ciun korespondaĵon oni sendu al la Prezidanto 4 Rue Chotard 30 ALES.

La administrantaro invitas ĉiujn esperantistojn aliĝi al "Sia" federacio.

Atendante la malfermon de la federacia poŝtĉekonto, la gesperantistoj kiuj ne apartenas al iu Esp-grupo estas petataj sendi sian aliĝon kaj eventuale la abonon al Sud-Franca Stelo al :

Groupe Esperantiste " La Verda Stelo "

4 Rue Chotard 30 ALES

C.C.P. MONTPELLIER N°

kiu ilin transdonos al la respondeculoj.

La Prezidanto.

CERCLE CULTUREL ESPERANTISTE NIMOIS : Lasta trimonato 1968

Dum la tri lastaj monatoj, nia grupo havis gravan aktivecon... Ciu unua merkredo, la grupanoj kunveniĝis en la Urba Biblioteko por labori kaj diskuti.- Tielmaniere, oni sukcesis organizi, denove, la ekspozicion " La Esperantista Libraro ", fankonata kolekto kiun nia samideano Lontaine starigis kaj kiu respondas al kutima argumento de niaj kontraŭuloj : Esperanto ne havas propran literaturon ! Prezenta en la enirojo de la biblioteko dum kvar tagoj, la ekspozicio, estis vidita de multaj personoj kiuj, neniam, havis ĝa oblecon aŭdi pri nia afero.- Sed nia ĝojo estis akcepti rimarkindan vizitanton La Urbestro de Prago kiu estis la gasto de nia ĝemeliturbo. Akompanis lin la sekretario de la Urboficejo. Tre atente, tiuj du gravuloj aŭskultis la klarigaĵojn de Ges-oj Volpelière.

Dum la novembra kunveno, oni uzis la rektan metodon laŭ la materialo (filmo, sonbendo) transdonita de samideano de Avignon. Tiu lernigado estas tre interesa, kondiĉe ke la aparatoj estu bone santempigataj.

La urbcturista sindikata ofico kunveniĝis, antaŭ nelonge, kaj konstatis ke multaj alilanduloj postulis sciigaĵojn pri Nimes, uzante la helpan lingvon. Tielmaniere, la esperantaj interfaldiloj presitaj de la ofico plonigas siajn ecojn kaj estas sendataj al korespondantoj.

Finfine, kun la samideanoj de Alès, La Grand-Combe kaj Condras, okazis, mezo de decembro, komuna kunveno celinta starigi Departementan Federacion. Ĝi povos postuli subvenciojn de Departementa Konsilantaro kaj organizi pli streĉe iujn agaĵojn, ĉefe, renkontojn kaj akceptojn, de alilandaj samideanoj. S-ro Raynaud (Alès) prezidas tiun novan asocion.

Kolkaj lernantoj perfektigis en la kurso de niaj amikojn Volpelière ; sed tiu tasko iĝas malfacila. Komuna kunveno estas antaŭvidota kun la samideanoj de Avignon, kaj oble, kun la grupo de Montpellier kie nia eks-kasisto, Inĝeniero Calvas estas, nun loĝanta.

Por la grupo,
La Sekr.

H. JANNEZ.

ESPERANTO LUDIS GRAVAN ROLON EN NEESPERANTISTA GERMANA-FRANCA
RENKONTIGO

=====

La Internacia Federacio de la Popolaj Universitatoj organizis de la 25-a ĝis la 27-a de oktobro 1968 Kulturalan Renkontigon inter francaj kaj germanaj membroj de P.U. en Gros-Gerau (apud Najenco)

S-ro René LLECH-WALTER, kiu havis la ŝargon organizi la Nacian Kongreson de la Popolaj Universitatoj en Perpignan dum septembro 1968 estis invitita de S-ro Pierre PETIT, la franca respondeculo de tiu manifestacio.

Oficiala akcepto okazis ĉe la Subprefektejo de Gros-Gerau kaj la Subprefekto, S-ro Alfred SCHMIDT, salutis germane la ĉeestantaron.

Interpretistino tradukis france sed tiel malbone ke la Subprefekto daŭrigis en esperanto, kaj S-ro René LLECH-WALTER tradukis france.

Poste, en ĉiuj okazoj, la Subprefekto parolis esperante kaj ĉu S-ro PETIT, ĉu S-ro LLECH-WALTER, tradukis france.

Kelkaj gazetistoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis esperanton, miris kaj raportis favore pri tiu ilo de interkompreniĝo kiu bone helpas kiam la interpretistoj ne estas kompetentaj.

René LLECH-WALTER.

KIA MANIERE Robert LLOANCY EKlernis ESPERANTON

La nova respondeculo de la " Juna Vivo " estas S-ro Robert LLOANCY. Robert LLOANCY naskiĝis en Tresserre, vilaĝo apud Perpignan (francujo), kaj kiam li estis lernanto de la unua grada lernejo en Tresserre-mem, li trovis en la tirkesto de sia lernotable broŝureton "premier Manuel de la Langue auxilliaire Esperanto". Li tralegis ĝin kaj konstatis la simplecon kaj regulecon de la lingvo.

Poste, li lernis en Liceo "Arago" en Perpignan kaj sekvis la osetanto-kurson gviditan de S-ro René LLECH-WALTER. La profesoro tuj rimarkis la kvalitojn de Robert LLOANCY kaj invitis lin partopreni senpage la Kulturalan Semajnon en "Grosillon" kaj la Forumon de Romo.

Post la Abiturienta Ekzameno, Robert LLOANCY studis en la Universitato de Toulouse. Perpignan perdis bonegan esperantiston sed Toulouse gajnis. Do, ĉio estas en ordo !

René LLECH-WALTER.

KASISTA ANGULO

Homo de nia Federacio kaj de nia movado, la kasisto ĝojas kaj dankas pri la malavara gesto de nia Prezidanto S-ro LLECH-WALTER kiu pagis la kotizojn :
 Dumviva bonfaranta membro U.F.E. 1500,00 F.
 kaj dumviva membro U.E.A. 700,00 F.

VIVO DE LA GRUPO EN PERPIGNAN

BELAJ VOJAGOJ DANK'AL ESPERANTO

Herkredon, la 2-an de oktobro 1968 je la 9-a vespero, ĉe la Notio Cambro de Perpignan, okazis duparta prolego pri " Belaj Vojaĝoj dank' al Esperanto".

La unua parto konsistis el humuraj rakontoj de S-ro René LLECH-WALTER, prezidanto de la Esperanto-Federacio " Languedoc-Roussillon" pri vojaĝo tra diversaj eŭropaj landoj " de Oslo al Zagreb ".

La duan parton prezentis gosinjoroj BENALET, instruistoj en Argelès-sur-Mer, kiuj revivigis mirindan vojaĝon tra Israelo dank'al tre taŭgaj kaj belkoloraj diapozitivoj.

Dum tiuj multnombraj ekskursoj la scipovo de l'esperanto alportis multajn facilajojn kaj permesis la rektajn homajn rilatojn, la solajn valorajn por ke eksterlanda vojaĝo estu fruktodona.

Multaj amikoj de la internacia lingvo kaj membroj de la Juda komunumo el Perpignan ĉeestis tiun prolegon, organizitan antaŭ la malfermo de la esperanto-kursoj kiuj okazos ĉiumerkredo de 18h30 ĝis 19h30 ĉe Lernejo Racine, por la plenkreskuloj ; kaj ĉiuŝaŭdo de 15h ĝis 17h, ĉiam ĉe Lernejo Racine, por la studentoj kaj infanoj.

M.V.

DISKO DE HALTADO

La Kultura Esperanto-Centro de Perpignan disponas pri haltadaj diskoj por aŭtomobiloj, kun la maksimo : " Esperanto via dua lingvo " (franco). Ofordonu ĝin al viaj amikoj. Estus bona propagando por nia movado. Oni povas aĉeti ĝin sendante 2,00 F (poŝtaj elspezoj inkluzive) al " Centre Culturel Esperantiste " 5 Quai Vauban - 66 PERPIGNAN.
C.C.P. Montpellier : 1.343-58.

=====
 Renactypé par la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon
 DIRECTEUR de la Publication : Lucien ANGEVIN . 30 LE CAILAR.
 =====